


# LA SUDA KRUCO



(Nova Serio)

Redakcio-Administracio:

BOX 731F, ELIZABETH-STR.: P.O., MELBOURNE (AŬSTRALIO).

Abono (por 12 numeroj):

AŬstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej; Ekster AŬstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: REGINALD BANHAM, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencej.

:: :: :: :: ::

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 147 (13th Year)

MELBOURNE (AŬSTRALIO).

12 DECEMBRO, 1932.

## AŬSTRALIA LAN-AŬKCIO.

Se oni volus pasigi tre interesan kaj ridplenan posttagmezon, oni ĉestu aŭkcion de lano. La manierajoj de la diverslandaj lanoaŭkciistoj, kaj la ŝajna haoso reganta en la aŭkciejo estas, por la nespertulo, vere amuzaj.

La lanoaŭkciroj okazas en la printempo, kaj daŭras dum la tuta somero. Eble estas du aŭ tri monatoj post kiam lia lano estas ricevita en la provizejon de la makleristo, ke tiu ĉi scias al la produktisto, ke lia lano estos proponata por la vendado je tiu dato. Li pli ofte ĉeestas, se eble.

Je la mateno de la vendado, li iras al la oficejo de sia makleristo, kaj estas tre ĝentile salutita de ĉiuj anoj de la firma konataj de li. Oni transdonas al li sian katalogon, kiu enhavas detalojn pri ĉiu speco de lano aŭkciota tiun tagon. La makleristo kutime metas valoron sur la diversajn kvantojn da lano kaj, precipe nuntempe, la produktisto estas plena de timo kaj tremado, kiam li eklegas la diversajn valorojn de sia lano. En la prosperaj tagoj, oni povus havigi tiom kiom 20 pencejn por ĉiu funto—iu produktisto eĉ ricevis 53 ŝilingojn!—sed nuntempe, bedaŭrinde, la meza prezo malaltiĝis ĝis 8 ŝilingoj pencej!

Tu ano de la firma de makleristoj kutime atenas sian klienton dum la tralegado de la katalogo, kaj delikate sugestias trinketon, kiu tuj sukcesas turni liajn pensojn al aliaj aferoj krom la lano.—Ne necesas diri, ke advokato por la malpermeso de alkoholaĵoj ne ricevas tre simpatian akcepton inter tiu ĉi anaro!

Nun la makleristo kondukas sian klienton al la bone lumigita elmontrejo, kie vidiĝas lanpakajegoj (bales) aranĝitaj en longaj vicoj sur la planko, kun sufiĉa spaco inter ĉiu vico ebligita la aŭkciistojn facile valoritaksi la lano. Ĉiu pakajego estas malfermita, kaj la aŭkciisto eliras sufiĉe da lano por taksu la valoron, kiun li notas en sia katalogo, kontraŭ la koncerna numero.

Ĉio aspektas tre bonorda antaŭ ol la aŭkciistoj eniras la elmontrejon, sed kiam la valorado estas finita, ŝajnas kvazaŭ estas pli da lano sur la planko ol en la pakajegoj. Tamen, estas la devo de la makleristoj remeti la lano en ĝiajn respektivajn lokojn.

Post la vivado de sia lano en la elmontrejo, la produktisto pli kontentigas pri la valoro, ĉar estas konata fakto ke, kiam lano estas kunpremita dum du-tri monatoj, ĝi difektigas kompare al kiam ĝi ĵus venis de la dorso de la ŝafo; tio estas, ĝi flaviĝas kaj aspektas iom malpura.

Je la tria posttagmezo, ĉiuj eniras la lanborson, kie oni aŭkcias la lano. La interno de la lanborso similas al teatro—la aŭkciisto kaj komizoj sur la scenejo, la aŭkciistoj en la foteloj, kaj la produktistoj kaj vizitantoj en la galerio. Dum la aŭkciistoj envenas, estas interese rimarki la multajn landojn reprezentatajn — Anglujo, Skotlando, Francujo, Germanujo, Japanujo, Usono k.t.p. Por la produktisto, la sento estas tiu de atendado kaj espero.

—Spirito de trankvileco, eĉ de enuo, ŝajne regas en la rondo de la aŭkciistoj. Precize je la tria la aŭkciisto legas la kondiĉojn de la vendo, kaj tiam vokas "Nun, pri Kvanto 1—kiom vi proponos?—15 pencejn?" kaj la bruego komenciĝas. Estas kiam la konkurado estas vigla, ke aferoj iĝas interesaj kaj amuzaj. Kelkaj aŭkciistoj, en siaj furiozaj klopodoj altiri la atenton de la aŭkciisto, sin turnas al kio ŝajnas al ni esti la plej ridindaj rimedoj. Ili eksaltas de la seĝoj, energie svingas la brakojn, fajfas penetre, ŝirkras, kaj faras aliajn nedignajn groteskaĵojn. La bruego surdigas, la ekscito estas ega, kaj bonŝanca estas tiu aŭkciisto, kiu sukcesas gajni la atenton de la aŭkciisto.—Oni pensus, ke oni ĉeestas la jaran kunvenon de la Asocio de Domestriroj, sed tio ĉi nur estas lanoaŭkcio, kie

milnionoj da pundoj iras al novaj posedantoj, kaj Aŭstralio iom pliriĉigas.

La produktistoj forgesas portempe sian ĉagrenon, ĉar ĉi estas konvinkita, ke tie ĉi, ĉiukaze, li ricevas la profiton de tutmonda konkurado, ĉe se, je la momento, la bezono ne plenumas liajn esperojn, kaj li revenas rezignacie al la kamparo, por kreskigi (kaj re-aŭporti) pli da lano.

—M.C.

## LA SANGA INTERNACIO DE LA MILITINDUSTRIO.

...Du jarojn antaŭ la batalo de Sedan, la 29an de aprilo, 1868, la germana kanonfabrikanto Krupp—kiu cetere estis oficiro de la Franca Honora Legio—sendis al Napoleono III sian novan katalogon kun granda laŭda artikolo pri la ŝtalanonoj, kiujn lia fabrikejo, kiel Krupp diras en la akompana letero, "fabrikis por diversaj grandaj ŝtatoj de Eŭropo"! Al tio la imperiestro respondis per sia danko kaj la esprimo de siaj bonaj deziroj "por la sukceso kaj la evoluo de industrio, kiu devas fari al la ĉamoro bonegajn servojn! Laŭvorta citado! Certe povas okazi, ke imperiestro estas malinteligenta. Sed tiugrade! Post Sedan li eble ŝanĝis sian opinion kaj siajn bondezirojn...

Ankoraŭ en la jaro 1914, dum kiam Poincaré iris al Peterburgo, por subskribi francan-rusan kontrakton, la firmo Krupp (Essen) kaj Schneider-Creusot (Francujo) faris kontrakton, por ne fari konkurencon unu al la alia! Dum tiu tempo iliaj inĝenieroj frate kunlaboris en la fabrikejoj Puttkopf je la modernigo de la armiloj de la caro...

### Dum la milito.

La angla ŝiario, kiu batalis kontraŭ la germanoj ĉe le Skager-Rak, posedis optikajn instrumentojn de germana deveno, liveritajn ses monatojn antaŭe de la firmoj Zeiss-Jena kaj Goerz-Anschutz. Ankau la francoj ekzakte observadis la germanajn soldatojn per Zeiss-instrumentoj. La germana firmo Magdeburger Draht- und Kabelwerke liveris al Francujo la pikdraton, en kiu antaŭ Verdun en Douaumont mortis centmiloj da germanaj soldatoj! Kaj la marsoldatoj en la submarboatoj de Germanujo kruele pereis, kaptite en retoj liveritaj de samlandanoj al la angloj.

Krupp vendis al Anglujo sian patenton pri tankoj. Krome li donis al la angla firmo Vickers patenton pri grenadbruligiloj, kontraŭ pago de 1 ŝilingo po grenado. La tie postula lita sumo estis 125 milionoj da ŝilingoj! Kaj tiam tio—oni facile povas kalkuli, kiom la germana firmo Krupp profitis po kape de ĉiu germana soldato mortfalinata en Flandrujo sub la anglaj grenadoj...

La angloj estis masakritaj en la Dardaneloj per kanonoj liveritaj de iliaj samlandanoj al la turkoj. La sama afero okazis al la aŭstraj soldatoj, kiuj dormas sian lastan dormon en Galicio. Jam en la batalo de Koniggratz (1866) germanaj fratoj mortpafis unu la alian per kanonoj, kiuj frate eliris el la samaj fabrikejoj kaj kies profitoj frate iris en la saman kason...

### Post la milito.

La Shearer-skandalo fluigis multe da inko. Tiu reklamagosto de kelkaj grandaj usonaj firmoj por konstruado de militŝipoj sukcese agadis por mal-sukceso de la dua konferenco por mara malarmado, kiu en junio 1927 kunvenigis en Geneva la delegitojn de Usono, Japanujo kaj Britujo...

Oni eksciis en Eŭropo, ke 143,000 dolaroj estis donitaj al usonaj senatanoj, por ke ili voĉdonu por la leĝo Jones-White pri la konstruo de militŝipoj.

Ankaŭ tiuj, kiuj en Usono kontrolas la kemiajn industriojn, sukcesis malhelpi, ke la geneva projekto pri la gasmilito estus diskutata en la usona senato.

En oficiala publikigaĵo de la franca Komercia Ministerio oni legis jenan reklamon: "Armiloj kaj municioj, grenadoj de ĉiuj kalibroj, torpedoj de ĉiuj markoj francaj kaj eksterlandaj."

### Maurice LECAT

(el "Contre la Guerre avec Einstein"), (represita el "La Juna Batalanto," Koln-Dellbruck, Bensberger Marktweiz 63, Germanujo, Esperanto-gazeto por katolikoj ĉefe, sed ankaŭ abonata le judoj, protestantoj kaj eĉ liberpensuloj. Ĝiaj artikoloj, radikale kuraĝaj kaj atakemaj kontraŭ la ŝovinismo, meritas vastan legatecon).

## LA UNUAJ EŬROPAJ LOĜANTOJ EN AŬSTRALIO.

Tradukita el la angla lingvo de

George Gordon, F.B.E.A.

Versajne la unuaj Eŭropanoj, kiuj celis trovi konstantan loĝejon en Aŭstralio estis du Holandaj ŝipanoj, kiujn, en Novembro de la jaro 1629, ilia siestro, komandanto Francois Pelsaert, pune forlasis sur la marbordo de Okcidenta Aŭstralio proksime al la sido de la nuna urbo Geraldton.

La ŝipo "Batavia" de Pelsaert estis unu el aro de komercaj ŝipoj, kiuj, proksime al la fino de la jaro 1628, ekveturis de Holando al la insuloj sudokcidente de Azio. En Junio en la sekvinta jaro, dum la veturado trans Hindujn Oceanon, ventego disigis la ŝipon "Batavia" for de ĝiaj kunŝipoj. Blovite tre suden for de la ĝusta veturovojo, ĝi rompiĝis sur la dangerplenaj rifuĝoj, ĉirkaŭantaj la insuleton "Houtman's Abrolhos", la plej suda koralforma formacio en la mondo. La pasaĝeroj kaj ŝipanoj en la nombro de ĉirkaŭ 300 personoj subordigis sur du-tri insuletojn de Houtman's Abrolhos, sed pro la rapideco de la deŝipigo, ili, prenante provizion da manĝaĵoj, malzorgis porti kun si sufiĉon da akvo. Ne trovante naturan fonton de akvoprovizo sur la nuda rokaro, kiuj estis ilia rifuĝejo, ili sekve estis en tre grava danĝero de morto pro soifo. Pro la ekstrema graveco de la pozicio, la ŝiestro, prenante kun si kelkon el la ŝipanoj, ekveturis en la pinaso apartenanta al la ŝipo, por serĉi la nemalhaveblan fluידון sur la ĉeftero, pri kiu ili sciis, ke ĝi ne estas malproksima. Ili sukcesis atingi la ĉefteron kaj tie subordigita. Malfeliĉe ili trovis nuda, senvegetaĵa la apudmaran teron, kaj, malesperinte akiri sufiĉan provizion da akvo, ili ekve-

turis al Batavio por helpo.

Dume la homoj forlasitaj sur la insuletoj estis ĉefoj en tia mezujo, ke ili trovis akvohavon, pri kiu ili unue supozis, ke inter ĝi kaj la maro estas subtera flujo, ĉar ĝia akvo levigadis kaj mallevigadis kun la tajdo. Tamen ĝi enhavis trinkotaŭgan akvon. Liberigite de sia maltrankvilo pri tio, ili devis fronti ankoraŭ unu gravan, tujan danĝeron pro la konduto de iuj el la ŝipanoj. En la frua parto de la veturado de la malfeliĉa "Batavia" la ŝarĝorgano, Jerome Cornelis, kaj iuj el la pli sendisciplinaj ŝipanoj kompletis ribeli, steli la ŝipon kaj fariĝi korsaroj. Ial ili ne tiam plenumis la projekton, sed jam nun pro tio, ke Pelsaert forestis, kaj la ŝipanoj kaj pasaĝeroj, inkluzive de kelkaj virinoj kaj infanoj, estis limigitaj per la mal vasta spaco de la maronita insuleto Houtman's Abrolhos, la kanalo Cornelis kaj liaj samideanoj devos konspiri kaj celis fari sin estroj de la situacio. Ili perforte ekpозis la rompitajn ŝipon, buĉis tridek-kvardek el tiuj, kiuj rezistis ilin, kaj kaptis la virinojn. Ili intencis kapti la ŝipon, kiun eble Pelsaert venigos el Batavio, por savi ilin, kaj tiam komenci piratecan karieron sur la apudaj maroj. Tamen malgraŭ ilia estrado de la ruiniĝinta ŝipo kaj du el la insuletoj, kie devis resti la rifuĝintoj, la homoj sur la tria insuleto sukcese kontraŭstaris iliajn atakojn, kaj kiam Pelsaert returne alvenis la insuletaron en la fregato Sardam, oni arestis kaj enketenis la konspirintojn. La plimulton el la arestitoj oni senprokraste ekzekutis, sed laŭ lasis vivi du el ili nomitajn Loos kaj de By. Al tiuj oni donis malgrandan boaton kaj provizon da manĝaĵoj kaj

### KVAKERISMO KAJ PACO.

Mi havas senpagaj ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj paco por disdoni. Bonvole petu per ilustrita poŝtkarto aŭ letero al:—D-ro Fred J. Williams, Samarai, PAPUA. (fratorganoj bv. represu.)

lasis al ili la duban eblon de vivado sur la dezerta marbordo de nekonata lando, priloga de sovaĝuloj.

Kvankam Tasman, veturonte en la jaro 1644, ricevvis ordonon kiel eble sciigi pri la forlasitoj, tamen versus me oni neniam akiris pluan informon pri tiuj nevolantaj loĝintoj en Aŭstralio. Oni nur povas supozi, ke se ili sukcesis amike interrilati kun la indiĝenoj, eble ili parte estis la kaŭzo de la enmiko de la sango de blanka raso en tiun de Aŭstralaj nigroloj. Post ducent jaroj Sir George Grey rimarkis tian mikson inter la indiĝenoj de Nord-okcidenta Aŭstralio.

### The Scriptures in Esperanto.

The British and Foreign Bible Society to-date, 31 December, 1931, had sold 8,444 Bibles, 22,727 Testaments, and 14,231 Psalms and Gospels in Esperanto, says The British Esperantist.

## THE FLEXIBILITY AND WORD-WEALTH OF ESPERANTO.

At the Spanish Esperanto Congress last May, Señor Inglada gave a resume of the grammar of Esperanto, pointing out its simple yet logical structure in comparison with those of the national tongues.

He explained that in Esperanto each preposition has its own limited function; in the national languages the same sense is often expressed by several prepositions. For example, "to be on the table," "to ride on a horse," "to ride on an ass" are translated in Spanish by "estar sobre la mesa," "montar a caballo," "montar en burro."

The flexibility of Esperanto, he asserted, is almost infinite. Assuming that there are in the "Plena Vortaro" (Complete Dictionary) of Prof. Grosjean-Maupin, 7000 Esperanto roots, one could, in mathematical theory, by combining them in all possible pairs, form some 40,000,000 different compounds! Of course, not all of such compounds could be used, as there are, at least at present, not sufficient corresponding notions to call for them; but, even reducing the usable compounds to a conservatively estimated million, and applying to them the 35 Esperanto affixes, one could easily create 35,000,000 words. This being so, and remembering that Shakespeare used only 15,000, and Cervantes, in his "Don Quixote," 9,350 words, one might say that the almost unlimited material for expression at the command of the Esperantist dwarfs the combined vocabulary of the two most eloquent of word-weavers to the level of mere infant prattle.

(Adapted from "Hispana Esperanto Gazeto," June, 1932.)

## EL "LITERATURA MONDO," BUDAPEST.

### LA VUNDA PUNKTO.

(Originalo de Raymond Schwartz, franco.)

Sur la bulvaroj oni vidis nur fremdulojn, ĉar dum somero Parizo fariĝas kosmopolita kolonio. Des pli feliĉa mi estis kiam subite mi rimarkis konatan vizaĝon!

La bonvena posedanto de tiu jam ne plu juna vizaĝo neniam apartenis al la rondo de miaj amikoj intimaj, nur malofte kaj nur tre suprajne mi estis rilatinta kun li, sed hodiaŭ li tamen aspektis alloga kiel floranta oazo en nuda dezerto.

Kun ĝoja ekkrrio mi tuj salutis lin kaj dank' al prava inspiro mi tuj alvokis lin en Esperanto,—prava inspiro pro du kaŭzoj: Unue, ĉar—kiel jam enire mi aludis—oni ŝajnas fenomenon ekzemplero de antaŭdiluva speco se dum junio de Ekspozicia Jaro oni parolus france sur la Parizaj bulvaroj, kaj due, ĉar mia maljuna kunulo parolas sufiĉe bone Esperanton, kvankam li

estas Lingva-Komitatano.

Mia ĝojo estis tiom sincera kaj la vetero tiom varma, ke mi tuj trenis mian viktimon al la teraso de gastema trinkejo.

'Vi faros al mi la plezuron akcepti glason da freŝa biero, ĉu ne?'—sed konsciante, ke mi sidas apud 'samideano' mi tuj prudente aldonis: 'Eble vi estas kontraŭalkoholisto kaj preferos glason da citronakvo?'

'Tute ne, mia kara,—mi tre volonte trinkos bieron.'

'Ah?' mi diris, mire kaj larĝe malfermante la buŝon,—vi trinkas alkoholon?—Sendube vi do estas kontraŭtaba... —Mi ne bezonis finparoli, ĉar sammonteme li elpoŝigis pipon kies respekinda brulujo nekontraŭdireble respondis al mia embria demando.—Re-'ah'—inte mi daŭrigis: 'Vi fumas?—Eĉ tabakon vi fumas? Mi do necese konkludas, ke vi estas vegeterano!'

'Vegeterano?—La biftuko kium mi tagmange malaperigis ne samopinas!'

'Diable! mi pensis mallaŭte kaj pli laŭte mi diris: 'Pardonu mian nediskretan trudemon, sed verŝajne vi estas ĉastemulo!'

Responde li nur ridetis kun ruza signifo kaj parolis: 'Ĉastemulo?—Kio estas tio?'

Se mi ne timus ankoraŭ pli difekti mian bedaŭrinde jam tre kadukan reputacion, mi raportus laŭvorte la tekston de mia klarigo, sed estas preferinde noti nur lian respondon:

'Nu, nu, li jesis, mi komprenas, sed, en tiu kazo, via insida demando estas tute superflua, aŭ ĉu vi forgesas junulo, ke mi naskiĝis en 1843?—Ah, dum miaj junaj jaroj... kaj li reveme blovis grizbluan fumrington en la aeron... kiel oni legas en romanoj.

Por mi la problemoj fariĝis ĉiam pli komplika kaj intriga. Jen eksterordinara tipo! Mi cerbumis por ek trovi lian vundan punkton:

'Strange, mi konfesis, vi estas Esperantisto kaj tamen vi estas vestita kiel normale civilizita Eŭropano, vi eĉ sportas ĉapelon!—La steleto en via butontuŝo ne havas kriantran dimensjon kaj ne estas pli ampleksa ol bone nutrita cimo,—ĝis nun vi ne ankoraŭ parolis pri lingvaj plibonigoj nek pri internacia organizado...'

'Estas vere,' li interrompis, 'ke vi ne lasis al mi la tempon,—tamen tio ne estis mia intenco.'

Mi daŭrigis mian enketon: 'Ĉu vi iam rimas? iam fondis novan gazeton?'

'Neniam, nek—kabareton! li aldonis malice.

'Bone!' mi venkocerte ektriumis post granda streĉo de la cerbaj ĉefoj, 'nun mi divenas: Vi kolektas poŝtmarkojn bildflanke!'

'Vi maltraŭs! Neniam mi korespondis krom okaze de vere urĝaj aŭ seriozaj aferoj.'

'Nu,' mi petegis venkete, 'ĉu do vi estas perfektulo?'

'Nur normala homo, mi modeste opinias, kaj tion dirinte li fintrinkis sian glason.—Intertempe mi pagis al la kelnero kaj mi reenpoŝigis mian monujon kiam, kvazaŭ haltige, li tuŝis mian brakon:

'Imagu, juna amiko, kio okazas al mi! Jus mi rimarkas, ke mi forgesis hejme mian monujon, kaj mi eliris speciale por aĉeti dentobrosan al mia edzino.—Ĉu vi eble povus pruntedoneti al mi kvin frankojn? nur ĝis morgaŭ, kompreneble...'

Ankoraŭ hodiaŭ mi ploras pri la malfeliĉa sorto de miaj kvin frankoj.

## KATOJ.

"Li estu malbenata."

La ŝipestro parolis tre certece, kaj estis iom da malico en la ekrigardo kiu li jetis post la foriranta doganisto. Kun kuntiritaj brovoj li ekmarŝis tienreen sur la ferdeko.

La aliaj kaŝis siajn ridetojn. Ili konis "la Maljunulon." Vere li ne estas tre maljuna, sed, inter la ŝipanaro de ĉiu brita ŝipo, la estro—ne gravas kiom da jaroj li havas—titoligas "la Maljunulo." Kun serena kuraĝo li renkontas la grandajn ĉagrenojn de la vivo, sed la malgrandaj ĝenoj—ofte tre komikaj—kolerigas lin ege. Iom post iom, tamen, li resereniĝis. Ĉesiginte la marŝadon, li sin turnis al la maato, kiu sin apogis al la barilo ĉirkaŭ la ferdeko, kaj demandis subite:

"Sinjoro Wilson, kiom da katoj ni havas sur la ŝipo?"

La maato sin rektigis malrapide kaj kun pensema mieno gratis la malantaŭon de sia kapo.

"Mi ne scias precize, sinjoro," li respondis hezite, "sed mi taksas ke mi havas ĉirkaŭ tridek."

"Ĥm," grunitis la Maljunulo. "Tiu malbeninda doganisto rimarkis, ke laŭŝajne ni havas multajn kaj demandis ĝuste kiom. Hazarde mi respondis 'dek unu.' Li notis la nombron sur la doganlisto kaj nun ni devos elmontri dek unu katojn antaŭ ol eliri la haveno."

"Kun tridek katoj sur la ŝipo, tio ne estos malfacila," rimarkis la ĉefmaŝinisto helpmiene.

"Mi ne tro certigas pri tio," grumbliis la Maljunulo. "Mi konas katojn."

La doganaj leĝoj de aŭstraliaj havenoj rilatas al katoj same kiel al aliaj bestoj enportitaj de ŝipo. Se la ŝipo liveras la bestojn ĉe haveno, ili devas pasigi specifitan periodon ĉe la kvaratena stacio. Se la ŝipo ne intencas liveri la bestojn, ĝi nepre devas forporti ĉiujn bestojn enportitajn. Ordinare la doganistoj neatenas la ŝipajn katojn. Ili traktas tiujn dorlotitajn bestojn kvazaŭ membrojn de la ŝipano. Post longa vojaĝo la katoj, por diversaj kialoj, ofte iras surteren; por ĉasi ratojn en la vartenejoj sur la kajo, por amrenkonti, k.t.p. Estas neeble sciigi ilin pri tio, kiam foriros la ŝipo, tial, ofte okazas ke kelkaj ili forlasigas.

Tamen, neniu pripensis plu pri la afero ĝis la tago de foriro. Ĉe la matenmanĝo ili estis gaja aro ĉirkaŭ la tablo en la mangosaloneto. La Maljunulo precipe estis en bona humoro. Fine li faldis sian buŝtukon, metis sur ĝin la ringon, kaj sin levinte parolis serioze:

"Nu, Sinjoro Maato, ne forgesu pri tiuj katoj. Se iuj mankos, mi devos pagi la monpunon."

"Tute bone, sinjoro," diris la unua maato, "lasu la aferon al ni."

"Vi povas kolekti ilin en la hospitalan kajuton," diris la Maljunulo. Apud la pordo li haltis kaj, kun petola brileto en la okuloj, diris kviete:

"Sed estus bona ideo, mi opinias, enfermi Nigrulon en mia kajuto ĝis la doganisto alvenos."

Ĉirkaŭ la tablo ili interŝangis ride-tojn. Bone ili komprenis tion, kion signifas la ideo. Nigrulo estis la plej batalema kato kiu iam vojaĝis sur ŝipo. Ĝi estis la nedisputebla maŝtrino de la centra parto de la ŝipo, kaj neniu alia kato povis alproksimiĝi sen danĝero de batalo. Enfermi ĝin en malgranda kajuto kun dek aliaj estus same maldelikate kiel inviti satanon al kunveno de sanktuloj.

Dum la mateno la tria maato kaj la radiisto prenis sur sin la kolektadon de la katoj. Nigrulo jam estis en la kajuto de la ŝipestro, tial ili nur devis fermi la pordon. Janeton kaj Doroteon, kiuj loĝis kun la boatestro kaj ĉarpentisto, ili baldaŭ trovis kaj enfermis en la hospitala kajuto. Selve de tio ili vizitis la kuirejon. Jen estis Lena, Pompei kaj Dumpi. En la dormoj de la maristoj kaj hejtistoj ili

trovis Ĝinger kaj Blui. Tiam ili ekvidis Vilĉjon. Sed Vilĉjo estis tre suspektema virkato, kaj antaŭ ol ili kaptis lin preskaŭ la tuta ŝipano devis aliĝi al la ĉaso. Finfine li sin trovis kun la aliaj en la hospitalo.

"Nur necesas unu plu," diris la tria maato.

Tamen, kvankam ili serĉis la ŝipon de fino ĝis fino, ili tute ne povis trovi alian katon.

"Ni devas trovi katon ie," ridis la radiisto, "alie ni estos malhonorigitaj por ĉiam. Neniam la Maljunulo permesus ke ni forgesu tian malsukceson."

Ili serĉis tra la vartenejo kontraŭ la ŝipo sur la kajo. Ili pasis al la ejoj pli malproksimaj. Estis vane. Neniu kato ie vidigis.

Batis la sonorilo por tagmanĝo. Ili sin turnis hejmen. Ili estis pasantaj la ŝipon lokitan malantaŭ la propra, kiam, sur la supro de la ŝtuparo kiu sin trovis sur la flanko de la ŝipo, ili vidis belektan katidon. Neniu ŝipano estis sur la ferdeko. Tuj la tria maato ŝtele suprengrimpis la ŝtuparon. Hipokrite li faris sonojn mallaŭtajn kaj allogajn, por ke li ne timigu la besteton. Li atingis la supron, ekprenis la katidon, metis ĝin sub sian jakon kaj kuris malsupren.

Ĉe la tagmanĝo ili anoncis tre kontente ke ĉio estas preta por la alveno de la doganisto.

Proksimume je la dua posttagmezo li venis. Lia mieno sugestis ke la devo, ne gravas kiom ĝi estas malplaĉiga, devas esti farata. La mieno de la Maljunulo radiis la komplezmecon. Li okulsignis al la tria maato, kiu malaperis en lian kajuton, kaj baldaŭ reaperis kun Nigrulo sub la brako. Li sekvis la Maljunulon kaj la doganiston ĝis la hospitalo. Antaŭ la fermita pordo staris aro de maatoj kaj maŝinistoj. Ili tute ne atentis la Maljunulon kaj liajn kunulojn.

"Ni kolektis la katojn en tiun-ĉi kajuton," klarigis la Maljunulo. "Bonvole eniru kaj kalkulu ilin. Mi fermos la pordon, por ke ili ne eliru."

Dume la tria maato, kvazaŭ senatente, tiris oreleon de Nigrulo. Estis nenio kio ŝi pli malamis. Ŝi baraktis forte kaj provis grati lin. Ree li tiris oreleon. Ŝi turnis la kapon subite kaj mordis lin, por kio li frapis al ŝi la kapon. Tio-ĉi tute ne plibonigis ŝian humoron, kaj ĝi estis furioza kato ĉiun li faligis en la kajuton post la doganisto.

La hospitalo estis nur malgranda kajuto. Sur unu muro, unu super la alia, estis du litetoj; sur la kontraŭa muro estis kanapeto. Rekte kontraŭ la pordo estis tirkestro.

Kiam la pordo fermiĝis malantaŭ li, la doganisto ekkalkulis la katojn. Li ĵus rimarkis du sur la supra liteto, kaj tri sur la malsupra, kiam griza katido freneze suprengrimpis sur lian vestaĵon, atingis lian ŝultron, kaj saltis sur la supran liteton. La sekvantan momenton ŝajnis kvazaŭ la aero estas plena de katoj: katoj miaŭantaj, grantantaj, saltantaj ĉien. Ili saltis de unu liteto sur la kanapeton; de tie sur la alian liteton; ili ruliĝis sur la planko en pilko de hara furiozo. Konfuzite, la doganisto sin ĵetis al la pordo por sin savi.

Ekstere la Maljunulo, apoginte la dorson al la pordo, kriegis ordonojn al la boatestro. La maato pruntis la helpon de siaj larĝaj ŝultroj kaj aldonis sian voĉon al tiu de la Maljunulo. Inter ridoj la aliaj ĉeestantoj same helpis. Estis nur tiam, kiam la senespera doganisto estis sin ĵetinta du-tri fojojn kontraŭ la pordon, ke ili, kvazaŭ surprizite, malfermis ĝin.

Eksplodis sur la ferdekon svarmo da katoj, kiuj, kun hirtigaĵaj vosto, kuregis ĉiudirekten.

"Ĉu vi kalkulis ilin?" demandis la Maljunulo milde.

"Mi . . . iel . . .", embarasite balbutis la doganisto.

"Do, ni devas ree kolekti ilin."

"Tute ne, sinjoro, tute ne. Tutkore mi kredas-vian diron ke estis nur dek unu katoj en la kajuto . . . ŝajnis al mi ke estas milo."

Ili subskribis la doganiston kaj, kun tiom da digno kiom li povis alvoki al sia helpo, foriris.

"Nu," diris la Maljunulo tre kontentigite, "eble tio lernigos lin ne sin trudi al aferoj, kiuj tute ne koncernas lin."

—Horatio Bags.

## KOBURGA KLUBO, MELB.

La kluba jarkunveno okazis en la Laborista Halo, Sheffield-str.; tridek anoj ĉeestis. La sek-jo informis, ke la frekvento por la jaro estis tre kontentiga; la meza nombro de ĉeestantoj estis 26. Kiam la klubo jam produktos pli da instruistoj ĝi komencos intensan propagandon por la Pyke Memorial Examination. Ankaŭ ĝi decidis iom pliigi la kotizon, por ke ĉiu membro ricevu La Suda Kruco.

MALNOVAJ ESPERANTAJ  
GAZETOJ.

Mi deziras ricevi plenajn kolektojn de la jenaj:

La Aŭstralia Verda Stelo (1908-1909)  
The Australian Esperantist (1908-10)  
The New Zealand Esperantist (1907)  
kaj The Benalla Independent kun la Esperanta fakto The Australian Esperantist (1910-1913?). Por ili mi sendus parton el la jenaj: Lingvo Internacia, 12a jaro 1907, 13a j., 1908, 14a j., 1909, duonlede binditaj ĉiu sola, kaj jaroj 14 kaj 15 kune binditaj.

Paul Tarnow, del. U.E.A.,

Dusseldorf-Oberkassel  
Dusseldorf-str. 5,  
Germanujo.

## ATENTU SINJORINOJ.

Realismo? Jes—se per tio oni volas diri realan sentadon, realan simpatiecon. Sed la homoj ŝajne signifas nur la realismon de malnobla aferoj.

—Ellen Terry.

Superjara Fantazio—Je la 29a de februaro, 1932, la urbestro de Aurora (Usono) forlasis la oficejon por 16 fraŭlinoj, kaj eminentaj negocistoj—hotel- kaj magazeneŝtroj, bankprezidantoj kaj redaktoroj—ankaŭ donis siajn oficejon al virinoj por la daŭro de la tago. Fraŭlinoj prenis sur sin la rolojn de policanoj direktantaj la veturilaron, kaj fajrobatalistoj, kaj eĉ la ŝtata malliberejo dungis gardistinojn! Oni ne anoncas ĉu tiu-ĉi tiu amerikanajo estis sukceso, aŭ ne!

(El la Woman's Mirror.)

La Edzo (sarkasme)—Ĉu vi revenis por io, kion vi forgesis, kiel kutime?

La Edzino (dolĉe)—Ne, karulo—mi revenis por io, kion mi memoris!

Estas bone ke la homo estu kontenta—por la homo mem—sed ne estas bone por liaj ĉirkaŭaĵoj. La kontentaj homoj neniam instigas reformojn, aŭ lumigas malhelajn angulojn, aŭ en-lasas la freŝan aeron en aermanakaj lokojn.—Eden Phillpotts.

Safidkotletoj hispanaj. el Hispanujo.

Havigu tiom da kotletoj kiom necesas, netigu ilin, gustigu per pipro kaj salo, kaj kovru ilin per ovoj kaj paneroj. Fritu ilin en butero kaj drenu.

Metu ilin ronde sur lito de pistitaj terpomoj, kaj ornamu la pladon (kiu devas esti sufiĉe granda), per tri diverskoloraj pureoj, t.e. lenta pureo, verd-piĉa pureo, kaj terpoma pureo; ankaŭ aldonu malgrandajn bakitajn toma-tojn kaj brunan saŭcon, gustigitan per limona sukco.

## Nĝgpmoj el Svisujo.

Senŝeligu, de-korigu, kaj tranĉu ses acidajn pomojn. Metu ilin en kaserolon kun limonŝelo, iom da akvo, kaj du uncoj da sukero; kuiru ĝis mola. Tiam ĥrotu tra kribilo; aldonu unu kuleregon da kremo; malvarmigu. Boligu duonpajnton da lakto, kun iom da vanilo kaj sufiĉe da sukero por dolĝigi. Kirliu la flavaĵojn de kvar ovoj, enmiksu en la lakton, kaj remetu sur la fajron ĝis dikigo; sed ne boligu. Buterigu pastpladon, enmetu la pomopureon, kaj kovru per la preparita kustardo. Kirliu la ovblankaĵojn, kaj kiam ŝaŭmaj, metu ilin en pecoj sur la supron; aspergu per sukero, kaj baku en suŝĉe varma bakformo, ĝis la ovblankaĵoj estas brunetaj.

## Esperanto in Sweden.

The annual report of A.B.F. (the Swedish Workers' Educational Assoc.) shows that Esperanto has now more students than any other language. Classes (with Government support) were:—

|                     | 1930-31. | 1931-32. |
|---------------------|----------|----------|
| Esperanto . . . . . | 299      | 432      |
| English . . . . .   | 303      | 344      |
| German . . . . .    | 5        | 115      |
| French . . . . .    | 4        | 9        |
| Russian . . . . .   | 1        | 1        |

The average enrolment for a class is 12; in the Esperanto classes the average enrolment is 15. This shows 6,800 Esperanto students last winter. (The British Esperantist.)

**Malmarmada Konferenco.**—Se bierfaristoj kaj vendistoj de brando diskutis pri malpermeso de alkoholo aŭ se buĝistoj estus invitataj esprimi sian opinion pri vegetarismo, tio estus ekzakte la sama afero kiel en Genève la disputado de generaloj kaj admiraloj, kiujn la registaroj tien sendis kiel kompetentajn ekspertojn pri malmarmado.

**Miskompreno.**—En publika kunveno kun ĉeestantoj de ĉiuj tendencoj unu frazo (la parolanto prelegis en franca lingvo) trovis ĝeneralan aplaŭdon. Unuj estis komprenitaj: "Il nous faut desarmes!" ("Ni devas malmarmi"); aliaj: "Il nous faut des armées!" ("Ni bezonas armeojn").

(El "La Juna Batalanto," Koln.)

## SERIOZE KAJ SERĈE.

## Bona kuracilo.

La kuracisto Bambulo tute ne ŝatas esti ĝenata dum la nokto. Je la dua horo matene, iu vekas lin: "Tuj, sinjoro doktoro, tuj! Mia filo englutis muson!"—"Nu, englutigu al li la katon kaj lasu min trankvila!"

**Perdiĝas per pruntedono amiko kaj mono.**

"Kiam mi devas alveni por fine ricevi la monon? Ĉu la 31-an?"—"Ne, tiam mi ankoraŭ ne havos la monon!"—"Kaj la unuan de sekvonta monato?"—"Ho, ne: tiam mi jam ne havos ĝin!"

Vizitanto (vidante knabeton kiu tranĉas la herbejon antaŭ la domo)—Ĉu la patrino estas hejme?

Knabeto (malafable)—Vi ne pensas ke mi tranĉas la herbon por tio ke ĝi estas longa, ĉu?

Kia estas la diferenco inter homo kaj kamelo?

Ja, tute simpla: la kamelo povas labori dum tuta semajno ne trinkante, kaj la homo povas trinki tutan semajnon, nenion laborante!

Se, ekzemple, vi trovas en via pantolono, bankbileton de 100 frankoj, kion vi pensus unue?

Ke mi erare eniris en fremdan pantolonon.

## Demandoj.

- (1) Kiuj estas la du plej altaj montoj en la mondo?
- (2) Kiom da vortoj uzas parole la simpla homo, kaj la klerulo?
- (3) Ĉu bufoj estas venenaj?
- (4) Kial la bumerango, ĵetita, revenas al la ĵetinto?
- (5) Kiom da ostoj enhavas la homa korpo?
- (6) Kiuj estas la plej longvivaj el la ekzistantaj gazetoj?
- (7) Ĉu estas vulkanoj en Grand-Britujo?
- (8) Kiu besto spiras per la okuloj, krom la nazo?
- (9) Kiomlonge estas la Granda Ĥina Muro?
- (10) Kiu komponis "Karmen"?
- (11) En kiu dato la granda milito oficiale finiĝis?

Dando (telefone)—Hello! Ĉu tio estas la radio sendstacio? Ĉu vi brodkastos sendaĵon por mi?

Voĉo—Ĉu estas viv-kaj mort-afero?

Dando—Bona ĉielo, jes! Mia lakeo estas elirinta por la tuta tago—mi tute ne scias kien—kaj mi povas trovi nur

unu gamaŝeton. Ĉu vi petos ke li telefonu min, kaj diru kion ajn li faris pri la alia?

Nova patrino—Tiu ĉi ne estas nia infaneto! Vi estas preninta la malĝustan infanveturilon!

Nova patro—Sh-sh! Ĝi estas pli bela infanveturilo ol la nia!

### KRONIKO.

**Melbourne, Vic.**—Estas plezuro informi, ke la jenaj anoj de l' Melb. Esperanto Soc. gajnis ĉe la elementa ekzameno de B.E.A.—Fino Marshall, s-ro Dandridge, kaj f-ino Searle kaj s-ino Holmes kun honoro. Gratulojn al ĉiuj.

Kunlaborante, la komitatoj de la Melbourne Klubo and Melbourne Societo okazigis tre sukcesan dancvesperon en Oktobro, and donacis la profiton al la kaso de la Suda Kruc.

The Coburg Esperanto Group will hold a social evening in the Labor Hall, Sheffield St., Coburg, on Thursday evening, December 15th. A cordial invitation to be present is extended to all Esperantists.

### ANNUAL CONCERT OF THE MELBOURNE ESPERANTO CLUB.

The Melbourne Esperanto Club will hold its annual concert in the Australian Church Hall, 19 Russell St., on Wednesday evening, Dec. 15th. A bright, interesting program of musical and dramatic items, entirely in Esperanto, has been arranged. During the evening the results of the Pyke Memorial Examination will be announced and the special prize and certificates presented. The price of admission will be 2/-, the profits to be given to the Pyke Memorial Fund.

### TO OUR SUPPORTERS.

Thanks for the following:—Mr. Brabazon (Sales), 1/4; Mrs. Hanks, 4/6, Sept., '33; Misses Cox and Walford (Proceeds Dance), 41/8/3; Mr. Towsey, 4/6, Oct., '33; Mr. M. Martinek, 9/6, July, '34; Mr. G. Bird, 4/6, Aug., '33; Mr. F. White, 4/6, Oct., '33; Miss P. Beswick, 4/6, Oct., '33; Mrs. F. Trewin, 4/6, Aug., '33; Mr. R. S. Craig, 4/6, Oct., '33; Mr. F. T. Bury, 5/-, Jan., '34; Mr. W. T. Middlebrough, 9/-, Sept., '32; Mrs. H. Thomson, 4/6, Oct., '33; Mr. L. W. K. Wirth, 4/6, Nov., '33; Mr. T. L. Enderby, 9/6, Oct., '33; Mr. J. N. Ivičević, 5/-, Sept., '33; Mr. W. Woolhouse, 4/6, Oct., '33; Mr. R. J. Fitzgerald, 10/-, Nov., '33; Coburg Group (Sales), 8/8; Melbourne Esperanto Club (Sales), 9/-; G. W. Card, 5/-, Nov., '33.

### RECENZ(ET)OJ.

**Kiki:** Esperanto-Junulara Biblioteko n-ro 2. Verkis Emma Osmond, eldonis Heroldo de Esperanto. Prezo neindikita; 36-paĝa libreto—serio de naŭe ĉarmaj vortobildoj el la vivo de imagema infano. "mufino" (lau Fulcher and Long, kaj Rhodes, "mufeno") estas tekuko, difinas Boirac. Ĉu ne (freŝbakita) paneto, bulko?

"La Langue Internationale; le problème et sa solution." Traduko el la "Fundamenta Krestomatio" de M. Jaumotte. Jam antaŭ la milito A. Wackrill donis al anglinglavanjo bonan tradukon de ĉi fama artikolo de "Unuel" (d-ro Zamenhof). Jen franca, kun paralela Esp-a originalo. Ĉi tiu logike konstruita argumento por nia afero ankoraŭ restas eble la plej trafa, konvinkiga iam verkita en tiel mallonga amplekso. Kiam ni, laborante en malfacilo, sentas tenton lasi la manojn fali neespere, ni ĉerpu denove la vinon de freŝa kuraĝo el ĉi tiu nektara fonto. S-ro Jaumotte faris utilegan propagandilon, kiu sendube tiros novajn fortojn al la vicoj de niaj francaj amikoj.

"De Internationale Taal: het vraagstuk en zijn oplossing." Sama traduko farita de Willy Schutter por flandranoj. La supraj rimarkoj plene adaptiĝas al ĉi tiu. Ambaŭ haveblaj ĉe Belga Esperanto-Instituto, 11 Kleinse Hondstraat, Antverpeno. Prezo 5 fr.

**Romaj Elegioj: La Taglibro de Goethe.** Tradukis K. Kalocsay; eldonis Literatura Mondo, Budapest. Pagoj 80, poŝformata. "Du versaj verketoj montrantaj la erotikan Goethe, kies erotiko puriĝas alta kaj nobla en la flamo de l'arto kaj amo," diras la antaŭparolo de la tradukinto. Mi kuraĝas aserti, ke, de la plimulto, la brila proz-ekskordo estos legata kun pli da intereso ol la tradukaĵo mem. Ŝajnas, ke Kalocsay lasis enfiltriĝi en sian tekston almenaŭ iom de la neklaraj trovigantaĵe de la originalo. En mia opinio estas vane atendi grandan aĉetecon de verkoj, kiuj nepre bezonas, sed ne havas, akompanan komenton. Mi preskaŭ dezirus, ke Kalocsay tradukonte turnu la atenton al pli vaste, pli populare postulatataj libroj aŭ donu al ni frukton de sia originala protalento. La lingvaĵo de la ĉefmajstroj, kiaj Shakespeare, Dante, Goethe, svasmas je subtilaj, profundpensaj aludoj. Tamen, pacienca kaj simpatia leganto trovos jen kaj jen rekompencan forme de pensoj admirinde esprimantaj kaj linioj perfekte melodijaj. Prezoj: silkebina, 1 doll. bind., 0.60 doll., broŝ., 0.40 doll.

(Ĉi tiuj kaj ceterajn verkojn eldonitajn de Literatura Mondo oni mendu ĉe s-ro Thomson, "Fallengatta," Church-str., Pymble, N.S.W.)

**Esperanta Teknika Medicina Vortaro**, de d-ro Briquet. Eld. Internacia Medicina Revuo, 255 avenue Longchamp, Bruxelles, Belgujo. Zorge binita, presita sur luksa papero, ĝi estas grava verko de 360 paĝoj: 3675 vortoj, la plej multaj kun ĉervajoj kaj diverslingvaj tradukoj.

La kompilito alvokas al ĉiu kuracisto, kiu havas kompetentecon kaj tempon por tio, ke ili bonvolu ekzameni la vortaron kaj sendi siajn proponojn, kritikojn ktp. La tasko detale, vorton post vorto, recenzi ĉi tiun verkon estas kompreneble por ni neebloj, pro diversaj kialoj. Ni nur povas ĝin senhezite rekomendi al ĉiu Esperanta hirurgo kaj medicinisto, kiel nunan helpilon en sia korespondanta laboro kaj kiel bazon sur kiu ili kolektive konstruu ankoraŭ pli ampleksan kaj kontingentan fakvortaron.

Plaĉos al multaj la uzado de h ĉe la vortoj enhavantaj la grekan Ĉi (X) guturalon, (ekz. bronika; sed kial ne "tehniko"?); "abstemia" sin trovas, sed ne la pli ĝenerala "abstin(en)ca"; "anstaŭti", sed ne la Zamenhova "substitui". "Dement" (mensmalsan) kolizias kun la difino donita en la Plena Vortaro. "Denta ŝtumpo" (stumpo).

La forta influo de la greka lingvo sur la disĉiplojn de Aesculapius montrigas en la amaso de vortoj karakterizitaj per la negacaj afiksaj -a kaj -an (ekz. a-bazio, nekapablo por norma irado; an-organa, senviva, minerala), per la afiksaj bradi- (malrapida) brahii- (mallonga), dolih- (longa) kaj aliaj. Supozinde estas, ke verkante artikolon por populara okulo kuracisto ne uzas "ptozo" anstaŭti "falo", "turgesci" anst. "ŝveli"; staras en la vortaro multaj "tehnikaj" vortoj, vestantaj simplajn konceptojn, por kiuj jam ekzistas en la nefaklingva Esperanto formaj ĉe kompreneblaj: "dekoritiki" (senŝeligi).

Pri kritiko mi haltu. La laboro de d-ro Briquet meritas vastan rekonon. Ĉi kuracisto uzanta Esp-on lojale subtenu sian sindonon kolegon, mendante senprokraste La Teknikan Medicinan Vortaron. Prezo: du dolaroj, bindita.

(Robo)

Post longjara dormo la evangeliKristana gazeto **Die Regno** venas al ni, nroj 1-4. Ĝi enhavas artikolojn pri Kristaneco kaj Esp-o kaj pri la Universala Kongreso el vidpunkto de la Kristana Esperanta Ligo Internacia. Kompare kun la Esperanta fermento ĉe la proleta internacio, la malmulta movo de nia lingvo inter la organizita kristanaro estas preskaŭ ne perceptebla. Tio estas efektiva honto por institucio nomanta sin ĉiuhoma kaj kredanta al la miraklo de Pentekosto. Kvapaga, abono 2 ŝil., ĉe Paul Hubner, Polkenstrasse 4, Quedlinburg, Germanujo.

La Nova Epoko, n-ro 4, dumonata literatura gazeto de S.A.T., Kolmstr., 1, Leipzig 0 27, enhavas bonegajn lingvajn studojn de Waringsho kaj Lippmann, la unua pri neologismoj kaj la dua pri Adverboj ĉe Substantivoj (la neĵuste kondamnitaj): "Stranga Fragmento" de Jack London, kaj paĝojn pri la arto kaj scienco. Abono 1 dolaro; presita en 3000 ekzempleroj.

## LINGVA DISKUTEJO.

(Instgu) celantaj kulturi pli akran ungvosenton ce niaj progresintoj.) "Escepte" logike signifas "exceptationally" (Millidge), tamen mi pensas, ke ĝi estas pli ofte uzata en la senco de "except" (esceptinte).

Oni devas diri, laŭ bonstilo, "ĉi tiu matene", kiam ankoraŭ estas mateno: kaj "hodiaŭ matene" kiam la mateno estas jam pasinta.

Car "ĝis" estas ankaŭ konjunkcio, ne estas negramatika uzi ĝin konjunkcie antaŭ infinitivo, sed mi ne povas citi ekzemplojn.

Zamenhof uzas "societo" en senco de simpla kumaleo ĉe Psalmo 116/26/5, kaj Grabowski ĉe Maseppa vi 31. Vidu ankaŭ Fab. de Andersen Vol. 1, 78/5, kie Z. uzas "kompanio"; ĉe Marta 189/36, "en akompano." Mi ne ionas ĉiujn citojn.

Angloj inklinas uzi "emfaze" por "with emphasis", sed tiu vorto en kelkaj lingvoj havas la signifon "kun afektita, solena tono." Tial pli bone estas uzi "firme", "akcente", "insiste", "forte" aŭ alian fortigan adverbion.

Romano—a novel in the English sense of the word.

Novelo—a short story (fiction).

La Lingva Akad. nebone oficigis "rezultato" kiel radikon, sekve "rezultati" estas la devenanta verbo, sed neniu uzas ĝin. La partecipo estus "rezultatant". Klare la akceptota radikalo devis esti "rezult". Sed vidu "Vortoj de Prof. Cart." 60, kaj La Plena Vortaro, kie la du radikaloj ne estas uzataj tute sinonime.

Pri la finajo —unt por nova kondiĉa partecipo (ekzemple, "skribuntu") diras Drezon: "(Tio) estus lafoje tre preciziga kuntekstaĵo. Tre kuraĝaj estis ankaŭ la siatemparaj provoj de Grabowski ekuzi la verbigitajn partecipojn: amantus, amatus, en la senco de: estas amanta, estas amata. Zamenhof en la Lingva Respondo 15 kontrastis la tujan ekuzon de tiu ĉi formo, sed definitive ĝin ne malaprobas, transportante ĝian aprobon al la aŭtoritato de Lingva Komitato. Tiu formo tamen estas nuntempe uzataĵo de verkistoj inklinaĵ al originala kaj "futurismo" de la lingvo." Ekzemple Kalocsay kaj Seppik.

"Parkere" estas radikalo el Universala Vortaro kaj signifas tion, kion Angloj komprenas per "by heart." "Perkore" (per koro(ĝi)) ne havas tiun signifon, ĉar oni ne lernas per koro sed per memoro en la cerbo. Versajne la franca "par coeur" sugestis al Zam. "parkere" sed li donis "parkere" kun speciala signifo. Rimarku kiel Zam. ankaŭ donis "volonte" kiel radikalon kun speciala signifo ne sama kiel la partecipo de "voli." "Ju pli" . . . des pli" ne estas arbitre elpensita; sed devenas de la germana "je mehr . . . desto mehr."

Cox diras, ke "Sia" nur povas rilati al la subjekto de la frazo aŭ propozicio en kiu ĝi troviĝas, kaj, estante refleksiĝa, ĝi neniam povas fari parton de frazo, ekzemple: Li diris al ni, ke lia (ne, sia) hundo ĵus mortis" (Par. 135). Sed tiu frazo kun "sia"

estas tute klara. La korekta estas ĉe tre malklara, ĉar la leganto ne scias pri tio, ĉu lia hundo mortis aŭ la hundo de alia virseksulo. Karlo Bodo, en Literatura Mondo, Okt., 1925, p. 127, skribis: Sed se estis iu, kiun ne ebrigis sia propra gloro" (But if there was one, whom his own glory had not intoxicated. . .). Nekorekta, sed tre klara linio.

—R.B.

## RADIO COLUMN.

Lessons to be broadcast from 3LO.

Time: 7.25 p.m.

As far as possible the following will be adhered to:—

**Dec. 24th**—Resumé of pronunciation and grammatical rules dealt with in previous lessons.

Correlatives—tio, tiu.

Suffix—et.

Anecdote:—Filino—"Karlo petis mian manon hodiaŭ, sed mi diris, ke mi ne volas forlasi la patrino."

Patro—"Ho ne ĝenu vin pro tio.

Prenu ŝin kun vi."

**Jan. 7th**—Grammar—Use of the reflexive pronoun.

Correlatives—ĉio, ĉiu.

Suffix—eg.

Anecdote:—"Mi renkontis Johanon hodiaŭ matene. Li estis tre malgaja; kaj diris, ke li volas morti." "Kial vi ne invitis lin tagmanĝi kun ni."

## Respondoj.

- (1) Everest (29,002 futoj) kaj Kanchanjanga (28,156), en la Himalaja montaro; Mt. Blanc, la plej alta en Eŭropo, estas nur 16,000 f.
- (2) Tre povas esti, ke angla kampulo uzas nur de 500 ĝis 700 vortoj. La parolprovizo de klara homo estas eble 2000-3000. Shakspeare uzis ĉ. 20,000 en siaj verkoj; Milton ĉ. 8000.
- (3) Shakspeare malprave skribis, nomante la bufon "venena." Ĝi estas tute nermalutita al homoj, kiujn ĝi helpas, mangle forigante limakojn kaj aliajn gardenpestojn.
- (4) La bumerangon oni faras tiamaniere, ke unu parto pli rezistas la aeron ol la cetera. Kiam la ĵetenergio ekfiniĝas, la bumerango iras laŭ kurba vojo, kio fine alvenigas ĝin plimalpli al la komenca punkto.
- (5) En plenreskula skeleto estas ĉ. 206 apartaj ostoj.
- (6) La Tsung Pao" (novaĵoj de Pekin) estis fondita antaŭ 1400 jaroj; longlonge antaŭ la presinvento. La unue fondita angla gazeto estas "The Review" (la revuo), kies iniciatinto estis Defoe, aŭtoro de Robinson Kruzo.
- (7) Estas multe da estingigitaj vul-

kanoj en Britujo. La varmfontoj ĉe Bath jam nun estas la ununura formo de aktivo.

(8) Cervoĵo havas arkanaleton sub la palpebroj, per kiuj ili enspiras.

(9) 1500 mejloj.

(10) Bizet.

(11) La 31an de aŭgusto 1921.

## LA EDZINO DE LA BRUTARPELISTO.

de Henry Lawson.

La du-ĉambra domo estas konstruita el rondaj ŝtupoj, platoj, kaj fibra arĉŝelo, kaj plankita per splitigitaj platoj. Granda kuirejo, konstruita ankaŭ el arĉŝelo, kiu staras ĉe unu fino, estas pli granda ol la domo kaj verando kune.

Arbustaro ĉie—arbustaro senhorizonta, ĉar la kamparo estas plata. Neniu montaroj en la malproksimeco. La arbustaro konsistas el duonkreskaj, putraj indiĝenaj pomarbetoj. Nenia subkreskaĵo. Neniu por ripozigi la okulojn, krom la pli malhela verdeco de kelkaj "sheoak" arboj, kiuj sopiradas super la mallarĝa, preskaŭ senakva rivereto. Estas dekaŭ mejloj ĝis la plej proksima signo de civilizacio—kampara trinkejo sur la ĉefvojo.

La brutarpelesto (kiu estis eks-ŝaf-bienulo) estas for kun la ŝafoj. Lia edzino kaj infanoj estas lasitaj ĉi-tie, solaj.

Kvar ĉifone-vestitaj, kvazaŭ sekiĝintaj infanoj, ludas ĉirkaŭ la domo. Subite unu el ili ekkriegas: "Serpento! Patrino, ĵen estas serpento!"

La malgrasa, sunbruniĝinta virino ekkuras el la kuirejo, levas sian infancon de la tero, tenas ĝin sur sia maldekstra kokso kaj ekprenas bastonon.

"Kie ĝi estas?"

"Ĝen—irinta en la ŝtiparon!" kriegas la pli aĝa knabo—akravajaĝa, ekscitita bubo de dekunu jaroj. "Restu tie, patrino. Mi finos lin! Flanken—mi mortigos la friponon!"

"Tommy, venu tien ĉi, aŭ vi estos mordita! Venu tuj, kiam mi ordonas al vi, vi malgranda aĉulo!"

La bubo venas nevoleme, portante bastonon pli grandan ol li mem. Tiam li kriegas triumfe:—

"Ĝen ĝi iras—sub la domon!" kaj ekforkuras kun la bastonogelo levita. Samtempe, la granda, nigra, flavokula hundo, de mikstaj raso, kiu estas elmontrinta la pliiuzoran intereseon pri la tuta afero, rompas sian ĉenon kaj ekkuras post tiu serpento. Tamen, ĝi estas momenton tro malfrue, kaj ĝia nazego ĵus atingas la fendeton en la platoj, kiam la vosto de la serpento

## POR LA KOMENCULOJ

### LA CIKONIOJ (Daŭrigita).

"Kaj kion post tio?" demandis la idoj.

"Tiam ĉiuj cikonioj el la tuta lando kune renkontiĝos kaj la aŭtuna manovrado komenciĝos, kiam vi devos povi bone flugi. Tio estas la plej grava afero; ĉar kiu ajn el vi ne flugos lerte, tiun la generalo trapikos per sia beko kaj mortigos;—do, zorgu, ke vi atentigas la ekzercadon kiam ĝi komencas."

"Do, malgraŭ ĉio, ni pikiĝos, kiel diris la knabo; kaj jen! aŭskultu!—ili ree kantas ĝin."

"Atentu min, kaj ne ilin," diris la cikonipatrino; "post la granda manovro ni forflugos al pli varma lando, tre, tre malproksime de ĉi tie, super montojn kaj arbarojn. Al Egipto ni flugos, kie estas triangulaj ŝtonaj domoj, kiuj sin levas ĝis pinto super la nuboj; ĉiujig nomigas piramidoj, kaj estas pli antikvaj ol cikonio povas imagi. En tiu lando estas rivero, kiu, superfluantaj slajn bordojn, ŝlimigas la tutan landon, kaj la sola afero necesa estas formanĝi la ranojn."

"Ho, kiel bongustel!" kriis ĉiuj idoj.

"Jes, tio estas glora vivo! Oni havas nenion por fari la tutan tagon krom manĝi; kaj dum la tempo kiam ni vivas tie kun tia lukso, en ĉi tiu lando ne estas eĉ unu verda folio sur la arboj: estas tiel malvarmege ĉi tie, ke la nuboj frostiĝas kaj pece rompiĝas en blankajn flokojn." Ŝi intencis tiel klarigi la neĝon, sed ne sciis kiel pli bone ĝin esprimi.

(Daŭrigita.)

### THE STORKS (Continued).

"And what next?" asked the little ones.

"Then all the storks of the whole country will meet together, and the autumn manoeuvring begins, when you must be able to fly well. That is of the greatest importance: for whichever of you does not fly properly, the general will pierce through with his beak, and kill;—so take care that you attend to the exercising when it begins."

"So we shall be stabbed after all, as the boy said; and there! listen!—they are singing it again."

"Attend to me, and not to them," said the stork-mother; "after the grand manoeuvre we will fly away to a warmer country, far, far from here, over mountains and forests. To Egypt we fly, where there are three-cornered stone houses, which rise up into a point above the clouds; these are called pyramids, and are older than a stork has any notion of. In that country is a river, which, overflowing its banks, turns the whole land into slime, and all one has to do is to pick up the frogs."

"Oh, how nice!" cried all the young ones.

"Yes, that is a glorious life! One has nothing to do all day but eat; and during the time we are living there in such luxury, in this country there is not a single green leaf on the trees: it is so cold here that the clouds freeze, and break to pieces in white flakes." She meant snow, but did not know how to express it better.

(To be continued.)

Pen error: p. 7, line 58, read 1919, not 1929.

**Westralian Esperanto Society**, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikadojn al la sekretario.

**Masterton Esperanto Club** — Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A. Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; Prezidanto, Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks. 38 Workshop-rd. Visitors always welcome.

**Auckland (N.Z.) Esperanto Societo** kunvenas ĉiununde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: s-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro C. Brandon. Komunikadojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

**Melburna Esperanto-Societo**, Prezidanto, sinjoro P. Hudson; sekretariino, f-ino L. Irwin, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenoj: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Read-

ing Room, Collins-st., post la 18a lio.

**Sydney Esperanto Society**. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: s-ro A. W. Peacock; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfah, 64 Brighton-st., Croydon.

**Brisbane Esperanto-Societo** kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-st., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Viceprezidanto: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncke (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

**Wellington Esperanto Club**.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carthy, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.

malaperas. Preskaŭ je la sama momento, la bastonego de la knabo malleviĝas, kaj senhauĝitas la hundan mazon! Tamen, "Aligato" tute ne atentigas tion ĉi, kaj komencas subfosii la konstruaĵon; sed ĝi estas subigita, post barakto, kaj ree ligita per la ĉeno.

La hundo estas tro utila, por ke ili endangerigu gnan vivon en barakto kontraŭ serpento.

La edzino de la brutarpesto stariĝas la infanojn kune, apud la hundejo dum ŝi observas ĉu la serpento reaperos. Ŝi alportas du malgrandajn pladojn da lakto, kaj metas ilin apud la muro, por tenti ĝin elveni; sed ĉu forpasas, kaj ĝi ne montras sin.

Estas la sunsubira horo, kaj minacas tondro. La infanoj devas esti ŝirmataj. Ŝi ne permesos ke ili eniru en la domon, ĉar ŝi scias ke la serpento estas tie, kiu je ajn momento eble venos supren, tra la fenadoj en la kruda pratranko; tial ŝi portas kelkajn plenbrakojn da buligno en la kuirejon, kaj tien kondukas la infanojn. La kuirejo havas nenian plankon—aŭ pliguste, teran, plankon. Meze estas granda, krude-konstruita tablo. Ŝi enkondukas la infanojn, kaj devigas ilin grimpi sur tiun ĉi tablon. Estas du knaboj kaj du knabinoj—ĉiuj nur infanetoj.

(daŭrigita)

## The next number is scheduled for 18th Jan.